Fontos tudnivaló

Ehhez a vizsgarészhez szótár **nem** használható!
Munkaidő: 70 perc

1. Legu la tekston kaj aldonu la unuajn frazojn de la paragrafo! Vi trovos la frazojn miksitajn post la teksto; skribu la ĝustan literon en la tabelon! (0) estas ekzemplo por vi.

La poeto de enigmoj

_____ (0) La plej granda angla poeto kaj dramisto (1564-1616; angle Shakespeare). Tiom oni povas legi en *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV) pri la homo, kiu estas la temo de tiu ĉi artikolo. Sed kiu li estis? Ĉu fakte li estis tiu? Kion, kiom, kial, kiel li verkis? Kio okazis al li dum la 52 jaroj de la vivo? Pri ĉio ĉi tre malmulte estas sciebla.

_____ (1) sed ne restis eĉ unu sola manuskripto de tiuj verkoj. La postrestintaj skribaĵoj de Ŝekspiro havas oficialan kaj negocan karakterojn, el ili absolute ne senteblas la genieco de ilia farinto. Ĝuste tial pluraj esploristoj pridubis, ĉu vere tiu homo verkis la menciitajn ĉefverkojn.

_____ (2) ĉar fakte ankaŭ nenio, kion ni scias pri tiu William Shakespeare, kiu plej verŝajne tamen estis la verkisto de tiuj kreaĵoj, surhavas signon de genieco.

_____ (3) kiu helpus nin en la solvado de Ŝekspir-enigmoj. Ĉu eble la epoko povas doni iom da helpo? Tiun tempon oni nomas “Angla Renesanco”, “Tudor-epoko”, “Epoko de Elizabeta la Unua”. Kion signifas tio?

_____ (4) ke Renesanco estis samtempe kulmino de Mezepoko kaj heroldo de Nova Erao. La Angla Renesanco komenciĝas du jarcentojn post la unua, la Itala. Post tio, ke finiĝas la sanga Milito de Rozoj, batalo de du dinastioj (York kaj Lancaster) por la trono de Anglio. En 1485 surtroniĝas Henriko la Sepa, la unua reprezentanto de Tudor-dinastio. Lia filo, Henriko la Oka ne havanta filon de sia laŭleĝa edzino, eksedziĝas kontraŭ la malpermeso de la papo kaj fondas sian propran nacian eklezion. Tiel aperas la angla protestantismo. Post la morto de Henriko kelkajn jarojn regas lia plej aĝa filino Maria, subtenanta la katolikojn, poste lia malfortsana filo, Eduardo la Sesa, subtenanta la ekstremajn protestantojn. Finfine, la pli juna filino de Henriko, Elizabeta la Unua akiras la potencon. Dum ŝia regado efektiviĝas la ĝis kaj post tiam ne spertebla socia ekvilibro, kaj la kulturo ekhavas tian florepokon, kia tre malofte okazas en la historio de la homaro. Tiu prosperado donas klarigon pri tio, kial kaj kiel povis aperi la Elizabet-epoka teatra kulturo, sekve la angla renesanca dramo, sed malpli motivas la kvaliton de Ŝekspira verkaro.

_____ (5) ke ĝin karakterizas transiro de “mezepoka” (tradicia) al “moderna” (scienca) mondpercepto. Laŭ la mezepoka pensado en la makrokosmo kaj analogie en la mikrokosmo regas hierarkia ordo. En la granda mondo troveblas “ĉenego de ekzistantoj”, en kies supro staras Dio, kaj plej sube la Infero, inter ili la spiritaj ekzistantoj (supre) kaj la materiaj (sube), kaj en la centro de ĉio staras la Homo, kiu parte apartenas al spirita mondo (kiel bildo de Dio), parte al materia mondo (kiel korpohavanta animalo). Ankaŭ en la socio estas hierarkio: supre staras la reĝo, sub li la nobeloj, sub ili la aliaj, analogie en la korpo supre la cerbo, sub ĝi la koro, sub tiu la hepato.

_____ (6) Pro la malkovro de Ameriko (1492) la Tero iĝis samtempe pli kaj malpli granda. En Eŭropon venas multe da oro, ĝi perdas la valoron samtempe kun tiaj konceptoj kiel amo, fideleco, lojaleco. Koperniko en la centron de la kosmo starigas la Sunon anstataŭ la Tero. La konebla Dio de mezepoka filozofio malaperas ĉe protestantoj. Johano Kalvino eĉ parolas pri nekonebla, neantaŭkalkulebla, nebildigebla Dio.

_____ (7) La socio ekkonis tezojn de Niccolo Macchiaveli, laŭ kiu nek religio, nek la moralo koncernas la naturon de la politiko. La homojn samtempajn kun Ŝekspiro ĝuste tial interesis la problemo de moralo kaj tiu de regado. Ekzempe: kio estas la diferenco inter la fakte kaj jure reganta reĝo?

_____ (8) Sed homo kun grandega dramverkista talento kapablis aperigi ilin sursceneje. Ĉar li, Vilhelmo Ŝekspiro sciis: la arto estas spegulo, samtempe la vivo estas teatro. Li eĉ diris: “La tuta mondo estas teatro”.

Juna Amiko 96/3-4.

A. En la 15-16-aj jarcentoj tiu ĉi mondbildo komencas disfali.
B. En la politiko same regas malcerteco.
C. La biografiaj faktoj donas preskaŭ nenion,
D. La duboj havas bazon,
E. Lastatempe la historiistoj diras,
F. Se oni esploras la pensmanieron de la epoko, oni trovas,
G. Ŝekspiro.
H. Solvi tiujn demandojn povis neniu.
I. Sub lia nomo konserviĝis tridek ok dramoj, du longaj poemoj, kelkaj mallongaj, volumo de sonetoj,

0	**1.**	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**	**7.**	**8.**
G								

2. **Respondu mallonge al la demandoj!**
(0) estas ekzemplo por vi.

Batu la bananon, Billy!

Jen belega propono por ĉiuj ŝatantoj de komputilaj ludoj. Billy posedas la ĉarmon de malnova klasika arkad-ludo kaj ĝi ravas per siaj magiaj mondoj kiuj altiras kaj infanojn kaj plenkreskulojn. Nia heroo endormiĝas kaj forveturas al revo-lando, kie li devas alfronti, kaj trompi strangajn monstrojn, kiuj provas bari la vojojn de fantazio.
La ludo konsisitas el kvin diversaj mondoj, en kiuj oni devas trairi pli ol cent nivelojn. Estas belege desegnitaj la ĝangalo, la konstruejo, la koral-insulo, kaj vi malkovru mem kio ankoraŭ. Ĉiuj rolantoj aperas tridimensie kaj produktas diversajn sonojn, dum la ludo estas akompanata de KD-muziko. Oni renkontas figurojn, kiel bananojn, ananasojn, martelojn, lampojn, marstelojn kaj multajn aliajn. La tasko de Billy estas fari truojn per hakilo, borilo aŭ aliaj disponeblaj iloj kaj faligi la monstrojn, kiam ili eniras en la kaptilon. Al Billy helpas diversaj iloj, kiujn li povas trovi dum la ludo: tenispilkoj, kurŝuo, aŭ plia vivo. La ludo havas ne-perfortan, infanamikan ideon, ĝi estas konvena por ĉiuj pli aĝaj ol kvin jaroj, vi tamen ne glitu sur la eldiraĵo "kvin jaroj", ĉar la ludo havas du gradojn de facileco, kaj eĉ spertaj ludantoj bezonas kelkajn horojn por trairi ĉiujn nivelojn. La plezuro tamen estas granda pro la ekrana fajneco (800*600), bela muziko, komentoj pri la lerteco de Billy en Esperanto. La teksto estas montrebla en longega listo de lingvoj krom Esperanto, se vi ankoraŭ ne bone parolas la internacian, verŝajne vi povas trovi vian propran nacian lingvon eĉ se ĝi estas la feroa, galega aŭ bosnia. Por la ludfanatikuloj estas antaŭvidita ebleco por navigilo.

(Kontakto 2001/6)

0. Billy estas la heroo de *komputila ludo*.
9. Ĝin povas ludi infanoj _____ .
10. Ankaŭ _____ povas ĝin ĝui.
11. La ludo havas _____ nivelojn,
12. kaj _____ de facileco.
13. La ludo povas daŭri _____ .
14. Billy renkontras monstrojn en _____, kaj
15. li devas _____ ilin el kaptiloj.
16. Estas kvin diversaj mondoj, ekzemple _____ .
17. La ludon akompanas muziko kaj _____ .
18. La paroloj estas en _____ .

3. **Elektu el la subaj vortoj kaj enskribu ilin en la tekston.**
Atenton, estas du plusaj vortoj!
(0) estas ekzemplo por vi.

delfenoj, *fokoj*, malvarmaj, ursoj, griza, valoraj, naĝi, dentegojn, malprofundajn, viando, rompiĝi, longaj, bestoj, maro, fiŝojn

Ĉio interesa pri rosmaroj

Rosmaroj estas mamuloj, parencaj al *fokoj* (0). Ili pezas de 800 ĝis 1700 kilogramojn kaj estas _____ (19) de 2,7 ĝis 3,5 metrojn.

Etaj rosmaroj povas _____ (20) jam de la naskiĝo, sed ne vere ŝatas fari tion. Ili preferas kuŝi sur la patrino. Kiam ili havas du jarojn, ili ekhavas siajn _____ (21). Virrosmaroj ofte batalas, tiam eĉ la dentegoj povas _____ (22). Malamikoj de la rosmaro estas polusaj _____ (23), iuj _____ (24), kaj balenŝarkoj. Ili manĝas konkojn, _____ (25), marhelikojn, krabojn kaj sepiojn. La eskimoj ĉasis rosmarojn unue pro iliaj haŭto kaj _____ (26), poste ankaŭ pro iliaj _____ (27) dentegoj. Ili loĝas tre proksime unu al la alia, en grupoj. Ili preferas la _____ (28) partojn de _____ (29) oceanoj. Nuntempe vivas nur 200 mil rosmaroj, ili estas protektataj _____ (30).

(Juna Amiko, 2002/3)